

PERSONNAGES

MARC

SERGE

YVAN

Le salon d'un appartement.

Un seul décor. Le plus dépouillé, le plus neutre possible.

Les scènes se déroulent successivement chez Serge, Yvan et Marc.

Rien ne change, sauf l'œuvre de peinture exposée.

ROLULOJ

MARKO

SERĜO

IVANO

Salono de apartamento.

Ununura dekoro. La plejble senornama, neŭtrala.

La scenoj okazas laŭvice ĉe Serĝo, Ivano kaj Marko.

Nenio ŝanĝas, krom la ekspoziciata pentraĵo.

Marc, seul.

MARC : Mon ami Serge a acheté un tableau.

C'est une toile d'environ un mètre soixante sur un mètre vingt, peinte en blanc. Le fond est blanc et si on cligne des yeux, on peut apercevoir de fins liserés blancs transversaux.

Mon ami Serge est un ami depuis longtemps.

C'est un garçon qui a bien réussi, il est médecin dermatologue et il aime l'art.

Lundi, je suis allé voir le tableau que Serge avait acquis samedi mais qu'il convoitait depuis plusieurs mois.

Un tableau blanc, avec des liserés blancs.

*

Chez Serge.

Posée à même le sol, une toile blanche, avec de fins liserés blancs transversaux.

15 *Serge regarde, réjoui, son tableau.*

Marc regarde le tableau.

Serge regarde Marc qui regarde le tableau.

Un long temps où tous les sentiments se traduisent sans mot.

MARC : Cher ?

20 SERGE : Deux cent mille.

MARC : Deux cent mille?...

SERGE : Handtington me le reprend à vingt-deux.

MARC : Qui est-ce ?

Marko, sole.

MARKO: Mia amiko Serĝo aĉetis pentraĵon.

Ĝi estas proksimume unu metro sesdek alta kaj unu metro dudek larĝa, blanke pentrata. La fono estas blanka kaj se oni fermetas okulojn, oni povas ekvidi maldikajn blankajn transversajn eĝrubandojn.

Mia amiko Serĝo estas amiko delonge.

Tiu estas knabo kiu bone sukcesis, li estas dermatologo kaj li ŝatas Arton.

Lunde, mi iris rigardi la pentraĵon kiun Serĝo akiris sabate, sed kiun li deziregis jam de multaj monatoj.

Blanka pentraĵo, kun blankaj eĝrubandoj.

*

Ĉe Serĝo.

Surplanke, blanka pentraĵo, kun maldikaj blankaj transversaj eĝrubandoj.

Serĝo rigardas, ĝoja, sian pentraĵon.

Marko rigardas la pentraĵon.

Serĝo rigardas Markon, kiu rigardas la pentraĵon.

Longa tempo, kiam ĉiuj sentoj tradukiĝas senvorte.

MARKO: Multekosta?

SERĜO: Ducent miloj.

MARKO: Ducent miloj?...

SERĜO: Handrington reprenas ĝin al mi por dudek du.

MARKO: Kiu li estas?

SERGE : Handtington ?!

25 MARC : Connais pas.

SERGE : Handtington ! La galerio Handtington !

MARC : La galerio Handtington te le reprend à vingt-deux ?...

SERGE : Non, pas la galerio. Lui. Handtington lui-même.
Pour lui.

30 MARC : Et pourquoi ce n'est pas Handtington qui l'a acheté ?

SERGE : Parce que tous ces gens ont intérêt à vendre à des particuliers. Il faut que le marché circule.

MARC : Ouais...

SERGE : Alors ?

35 MARC : ...

SERGE : Tu n'es pas bien là. Regarde-le d'ici. Tu aperçois les lignes ?

MARC : Comment s'appelle le...

SERGE : Peintre. Antrios.

40 MARC : Connu ?

SERGE : Très. Très !

Un temps.

MARC : Serge, tu n'as pas acheté ce tableau deux cent mille francs ?

45 SERGE : Mais mon vieux, c'est le prix. C'est un ANTRIOS !

MARC : Tu n'as pas acheté ce tableau deux cent mille francs !

SERGE : J'étais sûr que tu passerais à côté.

MARC : Tu as acheté cette merde deux cent mille francs ?!

SERGÔ: Handtington?!

MARKO: Nekonata.

SERGÔ: Handtington! La galerio Handtington!

MARKO: Ĉu la galerio Handtington reprenus ĝin por dudek du ?...

SERGÔ: Ne, ne la galerio. Li. Handtington mem. Por si.

MARKO: Kaj kial ne Handtington aĉetis ĝin ?

SERGÔ: Tial ke ĉiuj ĉi uloj havas intereson vendi al privatuloj. Cirkulendu la merkato.

MARKO: Eble...

SERGÔ: Do?

MARKO: ...

SERGÔ: Vi ne estas en ĝusta loko tie. Rigardu ĝin de ĉi tie. Ĉu vi ekvidas la liniojn?

MARKO: Kiel nomiĝas la...

SERGÔ: Pentristo. Antrioso.

MARKO: Fama?

SERGÔ: Tre. Treege!

Paŭzo.

MARKO: Serĝo, vi ne aĉetis tiun pentraĵon je ducent mil frankoj, ĉu?

SERGÔ: Sed, kara mia, tio estas la prezo. Estas

ANTRIOSAĴO!

MARKO: Vi ne aĉetis tiun pentraĵon je ducent miloj!

SERGÔ: Mi certis ke vi preterpasus.

MARKO: Vi aĉetis tiun fekon je ducent miloj?!